

ĉiuj malsamaj ĉiuj egalaj



Ĵenja Amis

Por ni esperantistoj tio ne estas nur vortoj: tio estas nia vivo. Sed kiel ofte la politikaj gravuloj ripetas la vortojn, kiel “egalrajteco”, “demokratio”, “libereco” kaj tiel plu sen vere kompreni ilin? Kiom ofte la “gravuloj” mis-uzas ilin por mis-gvidi homojn kaj antaŭen-igi siajn ideojn pri la mondo, sociaj rilatoj, Dio – kaj foje eĉ por pravigi siajn kontraŭ-homajn agojn? “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” estas nomo de eŭropa (kaj tut-monda) eduka **kampanjo**, kies celo estas popularigi la ideojn de diverseco kaj egaleco, unua-vice inter gejunuloj, por ke pli da homoj komprenu, ke diverseco estas “ŝanco, ne **minaco**”!

La kampanjo, kiun organizis la **Konsilio de Eŭropo** (KdE) kunlabore kun la Eŭropa Junulara **Forumo**, komenciĝis en junio 2006 kaj ĝi daŭros ĝis septembro 2007. La kampanjo havis belan malfermon, kiam nigraj kaj blankaj **balonoj** flugis en la bluan someran ĉielon de Strasburgo, Francio, tuj ĉe la 49 flagoj de la membraj ŝtatoj de la Konsilio de Eŭropo.

La kampanjo “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” estas daŭrigo de hom-rajta kampanjo de KdE, kiu okazis antaŭ dek jaroj. Tamen, la kampanjo de 2006-2007 havas iom alian aliron al la temo de homaj rajtoj. “Antaŭ dek jaroj ni okazigis la kampanjon kontraŭ **rasismo** kaj **diskriminacio** sur-baze de haŭt-koloro. Nun ni havas ion alian. Ni havas kampanjon por Partopreno, Homaj Rajtoj kaj Diverseco”, diras Terry Davis, Ĝenerala Sekretario de la Konsilio de Eŭropo.

En ĉiu membro-ŝtato de Konsilio de Eŭropo estas speciala nacia komitato, kiu kun-ordigas la kampanjon en sia lando; la naciaj komitatoj konsistas el anoj de reg-

istaro kaj de junularaj organizoj de tiu lando. La agadoj de la kampanjo estas tre diversaj: stud-programoj, kunvenoj, koncertoj, diversaj inform-kampanjoj en lokaj, tutlandaj kaj ankaŭ internaciaj amas-komunikiloj. Ankaŭ la temoj de la aktivaĵoj estas tre diversaj: interkultura kaj interreligia **dialogo**, rajtoj de virinoj, infanoj, seksaj malplimulto, **handikapuloj**; defendo de minoritataj kulturoj kaj lingvoj – por diri nur kelkajn. Ankaŭ TEJO partoprenas en la kampanjo: ekzemple, per tiu ĉi numero de **KONTAKTO**, kiu temas pri Egalaj Rajtoj kaj Feminismo.

balonoj – vd. la suban bildon

dialogo – inter-parolo, inter-ŝanĝo de opinio

diskriminacio – ne-egaleca traktado de iu hom-grupo fare de alia

forumo – diskutejo; **Eŭropa Junulara Forumo** – organizo, kiu konsistas el diversaj junularaj organizoj

handikapo – malhelpo (korpa aŭ alia), kiu mal-facil-igas normalajn aktivaĵojn de homo

kampanjo – sistema agado por atingi iun celon

Konsilio – gvida elektita organizo, kiu plenumas diversajn (ankaŭ konsilajn) funkciojn; **Konsilio de Eŭropo** – organizo, kiu kunligas multajn eŭropajn ŝtatojn (nun 49)

minaci – montri intencon fari ion malbonan

raso – aro de homoj kun similaj korpaj ecoj;

rasismo – pens- kaj agmaniero, bazita sur la ideo pri supereco de iu(j) rasoj super la alia(j)



La kampanjo por homaj rajtoj

Maxime Cerutti, Oficisto pri politiko de laboro, socia inkluzivo, egaleco kaj homaj rajtoj, Eŭropa Junulara Forumo

La kampanjo “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” estas kampanjo por homaj rajtoj. Kiel bazon ĝi havas la **respekton** por homa **digno**, kaj ĝi alvokas la registaron, amas-komunikilojn kaj loĝantaron defendi tiun ĉi respekton. Ĝi estas eta rememorigo al la popolo, ke ĉiuj homaj estaĵoj certe malsamas en siaj ecoj, kapabloj kaj ebloj, sed tamen ke ili estas egalaj antaŭ la leĝo kiel anoj de la socio, kaj ankaŭ ke ĉiuj homoj estas egalaj rilate homajn rajtojn. Bedaŭrinde, en la nuna mondo, oni ankorau ne atingis tiun idealon.

La realo estas, ke en nia socio oni ankorau ne plene respektas homajn rajtojn – kaj temas ne nur pri la landoj kun nedemokratia registaro, sed ankaŭ pri la okcidentaj demokratioj. Kaj ĉar eŭropa junularo ne povas akcepti tiun ĉi danĝeran realecon, la kampanjo “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” de Konsilio de Eŭropo ebligas al junaj homoj partopreni en la konstruado de pacaj socioj, bazitaj sur diverseco kaj inkluzivo, en la spirito de respekto, **toleremo** kaj komprenemo. Pro tio, nun estas decida momento por eŭropaj organizoj partopreni en la agado pri homaj rajtoj, diverseco kaj partopreno, por antaŭenigi la aperon de inkluzivaj eŭropaj socioj. Junularaj organizoj devas kontraŭi malrespekton al homaj rajtoj, aparte kiam temas pri en-danĝer-igo de ilia propra ekzisto. La kampanjo “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” antaŭenigas la neceson de libero ĝenerale, kaj liberon de asocioj aparte.

La kampanjo bezonas ankaŭ plene uzi kaj plie disvolvi **ekspertizon** de KdE sur la kampo de edukado pri homaj rajtoj. Edukado pri homaj rajtoj antaŭenigas komprenon kaj agojn pri individuaj kaj kolektivaj rajtoj kaj respondecoj. Ĝi alvokas al disvolviĝo de edukaj programoj kaj aktivaĵoj kun la celoj antaŭenigi egalecon, kunlabore kun aliaj programoj, kiel interkultura lernado kaj partopreno. Per kelkaj vortoj, la kampanjo “Ĉiuj malsamaj – ĉiuj egalaj” de KdE estas unika ŝanco por gejunuloj sendi al Eŭropo kaj al la tuta mondo mesaĝon de paco kaj respekto per la antaŭenigo de diverseco.

ekspertizo – komisia, faka esploro

digno – mem-respekto

inkluziva – enhavanta en si, kiel parton de tutaj

respekto – estimo

toleremo – tiu, kiu ne kontraŭ-staras al io, eĉ se ĝi malplaĉas, akceptema

Trad. el la angla kaj faciligis Ĵenja Amis
Pli da informoj troviĝas ĉe <<http://alldifferent-allegal.info>>